ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 10-12-2018

Oktobro-Decembro 2018

JARKOLEKTO 115 - N. 1167-1169 - Oktobro/Decembro 2018

**Sur la kovrilo:** Katolikaj esperantistoj pilgrime en Fatimo 31.07.-01.08.2018

## ENHAVO

LA PAPO FRANCISKO INAŬGURIS SINODON PRI JUNAJ HOMOJ: LA SANKTA SPIRITO DONADU AL NI KAPABLON REVI KAJ ESPERI 51

LA ĈEFEPISKOPO PACELLI AKIRIS MERITON PRI LA NEŬTRALECO DE LA SANKTA SEĜO EN LA UNUA MONDMILITO 53

IKUE DUM LA 103-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN LISBONO, PORTUGALIO 54

LA UNUA ESPERANTO-PILGRIMO AL FATIMO 55

FATIMA JARCENTO EN TRARIGARDO 56

KION NUNTEMPE KREDAS MULTAJ KATOLIKOJ 57

OFENSIVO DE SATANO 60

LA REĜINO DE LA VIRGULINOJ 62

FESTO DE JESUO KRISTO LA REĜO 63

KANTO HONORE AL JESUO LA REĜO 64

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org *** Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli - **Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano:** Pavol Petrík. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA PAPO FRANCISKO INAŬGURIS SINODON PRI JUNAJ HOMOJ: LA SANKTA SPIRITO DONADU AL NI KAPABLON REVI KAJ ESPERI

***Per la enkonduka sankta meso komenciĝis merkredon la 3-an de oktobro 2018 en Vatikano Sinodo pri junaj homoj. La papo Francisko per sia homilio celis al tio, ke la sinodaj patroj sin lasu gvidi per la Sankta Spirito kaj li memorigis ankaŭ la koneksajn alvokojn de la Dua Vatikana Koncilio.***



### Ni komencu denove revi kaj esperi

En la evangelio de la enkonduka sankta meso aŭdiĝis vortoj el la evangelio de la sankta Johano: „Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi.“ (Joh 14,26) Kaj la papo Francisko rilate al tio diris: „Per tiu ĉi simpla maniero Jesuo proponas al siaj disĉiploj garantion, ke Li ilin akompanados en ĉiu ilia misiista laboro, kiu estos konfidita al ili: La Sankta Spirito estos la unua, kiu en la koroj de siaj disĉiploj konservados daŭre vivan rememoron pri la Majstro. Estas do Li, kiu kreas, por ke la riĉeco kaj beleco de la evangelio estu konstante fontoj de la ĝojo kaj la senĉesa renovigo.“

„Komence de tiu ĉi momento de la graco por la tuta eklezio, harmonie kun la Dia vorto, ni petu insiste la Sanktan Spiriton, por ke Li helpu rememorigi nin pri la vortoj de la Sinjoro, kiuj ekbruligadis niajn korojn,“ daŭrigis plu la papo Francisko en sia homilio, ĉar „tiu memoro en ni povas denove vekigi kaj renovigi kapablon revi kaj esperi.“

„Ni scias, ke niaj junaj kapablos akcepti profetaĵojn kaj viziojn ĝis tiu grado, en kiu ni, nun plenaĝaj aŭ ankoraŭ pli aĝaj, sukcesas revi kaj tiel ilin infekti kaj kun ili dividi niajn revojn kaj esperojn, kiujn ni havas en la koro,“ plu daŭrigis la Sankta patro.

### Ni estu sinodaj patroj oleitaj per la donaco de revoj kaj espero

„La Sankta Spirito al ni donadu gracon esti sinodaj patroj oleitaj per la donacoj de la revoj kaj esperoj, por ke ni povu ankaŭ olei niajn junajn per la donacoj de profetaĵo kaj vizio. La Sankta Spirito al ni donu gracon esti viva, efektiva kaj efika memoro, kiu el generacio al generacio ne lasas sin sufoki kaj dispremi fare de profetoj de plagoj kaj malfeliĉo, eĉ ne per niaj propraj limigoj, eraroj kaj pekoj. La Sankta Spirito al ni helpu trovi spacon por ekbruligo de koro kaj distingado de ĝiaj vojoj,“ eksplikis la papo Francisko sian sintenon komence de la sinodo, kun kiu li volas, ke estu aŭskultata la voĉo de la Sankta Spirito, kiu kolektigis en tiuj ĉi tagoj en Vatikano reprezentantojn de la eklezio el la tuta mondo.

### En sinodo la unuan fojon ĉeestas episkopoj el kontinenta Ĉinio

Kun granda kortuŝo bonvenigis la papo

Francisko ankaŭ du episkopojn el kontinenta Ĉinio, kiu la sinodon partoprenas tute unuan fojon en la tuta historio: „La tuta episkoparo kun posteulo de la sankta Petro



estas nuntempe ankoraŭ pli videbla danke al ilia ĉeestado.“

**Ni rigardu rekte en la okulojn de gejunuloj**

„Tiu ĉi espero... nin alvokas, por ke ni ekstaru kaj rekte rigardu la vizaĝojn de la gejunuloj, eĉ la situaciojn, en kiuj ili troviĝas,“ plu diris la papo Francisko, kiu volas labori pri tio, ke estu forigitaj malcertecoj, ekskludoj kaj perforto, al kiuj estas disponigita nia junularo. La junaj postulas de la eklezio kreivan sindonon, dinamikon plenan de entuziasmo kaj espero, por ke ili ne restu forlasitaj en la manoj de mortkomercistoj, kiuj subpremadas iliajn vivojn kaj malserenigas ilian vidon.

**Ni ne atentu proprajn aferojn, sed la aferojn de la aliaj**

Por povi kune revi, tio postulas, ke ni ne atentu la proprajn aferojn, sed la aferojn de la aliaj, kiel ni aŭdis el la unua legaĵo el la Letero al Filipanoj (Flp 2,4). Kaj ni eĉ pro la humileco opiniu la alian esti pli bona. „Kaj kun tiu ĉi menso ni strebadu aŭskulti unu la alian, por komune distingi tion, kion la Sinjoro postulas de sia eklezio,“ daŭrigis la papo Francisko kun alvoko, ke dum la traktadoj ne malaperu la atento pri la misio, al kiu estas ĉiuj partoprenantoj de la sinodo vokitaj, por ke ili ĉiam sin celu al pli granda bono, kiu utilos al ĉiuj.

**Ni aŭskultadu kun sincereco**

Plue la papo Francisko emfazis, ke se la patroj sincere kaj enpreĝe aŭskultos, ili kapablos eniri diversajn situaciojn, kiujn la Dia popolo travivas. „Aŭskulti Dion por kune kun Li ni ekaŭdu vokadon de la homoj; aŭskulti homojn, por ke ni kun ili povu spiri volon, al kiu nin vokas Dio,“ diris plue la papo, kiu la tempon de la sinodo konfidis sub patrinecan ŝirmon de la Virgulino Maria, por ke Ŝi akompanu nin dum „distingado de la signoj de la Spirito, por ke ni tiel singardeme meze de la revoj kaj esperoj akompanadu junajn homojn, por ke ili ne ĉesu profetadi.“

**Ni memorigu al ni mesaĝon de la patroj de la Dua Vatikana Koncilio**

Poste la papo Francisko sin turnis antaŭĉio al pli aĝaj sinodaj patroj, kiuj siajn unuajn paŝetojn en la vivo de la kredo faris ĝuste en la tempo, kiam finiĝis la Dua Vatikana Koncilio. Ĝuste al ili estis adresita mesaĝo



de la konciliaj patroj. Do „tion, kion ni aŭdis kiel junaj, estos bone denove al ni memorigi per vortoj de la poeto Friedrich Hölderlin: ´La homo plenumu, kion li promesis kiel



infano´,“ plu daŭrigis la papo sian homilion.

„La konciliaj patroj alparoladis nin tiel,“ citis plue la papo Francisko: „La eklezio kvar jarojn laboradis por junigi sian vizaĝon, por ke ĝi pli bone respondu al bildo de sia Fondinto, la Viva kaj eterne juna Kristo. Kaj konklude de tiu ĉi grandioza ´revizio de la vivo´ ĝi turnas sin al vi. Por vi junaj, antaŭĉio por vi ĝi per sia koncilio eklumigis la lumon, lumiganta estontecon, vian estontecon. La eklezio deziras, por ke socio, kiun vi konstruos, respektadu dignecon, liberecon kaj rajton de la homoj: kaj tiuj homoj estas vi... La eklezio esperas, ke vi kapablos ateste enportadi vian kredon en la vivon kaj la certecon de la ekzistado de la justa kaj bona Dio, kiu donas sencon al la vivo.“

### Ni larĝigu niajn korojn

Fine la papo Francisko instigis, por ke la sinodaj patroj larĝigu siajn korojn ĝis dimensio de la tuta mondo, ke ili ekkomprenu alvokojn de siaj fratoj kaj ke ili kuraĝe donadu sian junecan energion en iliajn servojn. „Batalu kontraŭ ĉiu egoismo. Rifuzadu doni trairejon al brutalecaj kaj malamemaj instinktoj, kiuj naskas militojn akompanantaj per malĝoja suferado. Estu grandanimemaj, puraj, respektemaj kaj sinceraj. Kaj kun entuziasmo konstruu pli bonan modon ol estas tiu nuntempa! La sinodaj patroj, la eklezio rigardas vin kun konfido kaj amo,“ finis la papo sian homilion inaŭgure de la sinodo pri junularo. ■

*Fonto: Gazetara centro de la Sankta Seĝo, Vatican News*

## LA ĈEFEPISKOPO PACELLI AKIRIS MERITON PRI LA NEŬTRALECO DE LA SANKTA SEĜO EN LA UNUA MONDMILITO

Spite de la deklarata neŭtraleco estis la Sankta Seĝo en unuaj monatoj de la 1-a mondmilito opiniata kiel aliancano de Germanio. Se ĝi poste akiris sian neŭtralecon, estis tio merito de la nova ĉefo de la papa diplomatio, la ĉefepiskopo Eugenio Pacelli, estonta papo Pio la 12-a. La tagon antaŭ la 100-a datreveno de la fino de la 1-a mondmilito atentigas pri tio vatikana historiisto prof. Johan Ickx, ĉefo de la historia arkivo de la 2-a sekcio de la vatikana ŝtatsekretario.

La historiisto respondeca pri la arkivo de la vatikana diplomatio rekonas, ke komence de la milito la Sankta Seĝo subiĝis al perfekta germana propagando. Ĝi ne konsciiĝis ekzemple kvanton de barbareco de la germana armeo



sur la teritorio de Belgio. Benedikto la 15-a estis ja eĉ nomata amiko de germanoj. Sed la ĉefepiskopo Pacelli rapide kapablis orientiĝi en insidoj de la germana propagando. Parolas prof. Johano Ickx:

„La ĉefepiskopo Pacelli sukcesis realigi revenon de Vatikano al neŭtraleco. La fakto, ke en la komencaj monatoj ĝi la neŭtralecon perdis, ŝajnas al mi tute evidenta. Oni povas diri, ke ekde septembro 1914 ĝis januaro 1915 estis Vatikano plejparte sur la flanko de germanoj. Sed Pacelli faris vicon da konkretaj paŝoj en vatikana diplomatio. Li forlokis homojn, kiuj estis tro ligitaj kun Germanio, kiel chargé d´affaires en Bruselo, nuncioj en Belgio kaj Bavario. Estis tio klara puriga kampanjo en vatikana diplomatio. Samtempe la ĉefepiskopo Pacelli ekligis firmajn amikecajn ligojn kun angloj. Tio ĉio kompreneble starigas en alian lumon pli postan agadon de Pio la 12-a kaj la hasteman prijuĝon de liaj sintenoj rilate al naziismo. Estas konate, ke lia amikeco kun angloj ne estingiĝis eĉ dum pluaj jaroj. Same tiel estas klare, ke tiu, kiu tiel bone orientiĝis en mensogoj de la germana propagando dum la 1-a mondmilito, apenaŭ povis fali en la saman insidon en la tridekaj jaroj. Ĝuste male. Li povis plej bone ekkompreni, ke Germanio volas per sia mensogo denove inundi la tutan Eŭropon.“ – diris al Vatikana Radio profesoro Johan Ickx, la ĉefo de la historia arkivo de la vatikana diplomatio. ■

*Fonto: Vatican News, 10.11. 2018*

## IKUE DUM LA 103-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN LISBONO, PORTUGALIO

En la tagoj de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018 okazis en Lisbono, Portugalio la 103-a Universala Kongreso de Esperanto. Kadre de la kongresa semajno en la preĝejo Igreja dos Santos Reis Magos (Campo Grande) – la preĝejo de la Sanktaj Tri Magoj proksime al la kongresejo de UK ĉiutage okazis la sankta meso en Esperanto, kiun partoprenis ĉirkaŭ tridek kongresanoj.



La 2-an de aŭgusto dum la sankta meso oni aparte memorigis forpasintajn esperantistojn, interalie la iaman prezidanton de UEA LEE CHONG-YEONG, kiu estis katoliko kaj membro de IKUE kaj karegan sacerdoton LAJOS KÓBOR el Hungario, kiu mortis antaŭ tri monatoj. Li dum pluraj kongresoj organizis ekumenajn diservojn kaj mescelebris en Esperanto dum multaj E-aranĝoj, interalie ankaŭ dum la 68-a UK 1983 en Budapeŝto. ■



*Fotis kaj raportas Marija Belošević*

# LA UNUA ESPERANTO-PILGRIMO AL FATIMO



La katolikaj esperantistoj realigis la unuan pilgrimon al Fatimo la 31-an de julio kaj la 1-an de aŭgusto. La pilgrimon nome de IKUE organizis la vicprezidantino Marija Belošević, kiu ankaŭ ĉion antaŭe pritraktis kun la kompetenta administracio de la fama pilgrimloko.

Dum la unua tago la esperantistoj kunpreĝis la rozarion kun la ceteraj pilgrimantoj, kaj en la kvina dekumo de la rozario ankaŭ aŭdiĝis la preĝo Saluton Maria en Esperanto.

La duan tagon aliĝis pliaj esperantistoj kaj la sanktan meson en la Kapelo de la Aperoj celebris sac. Benoît Ente, OP el Francio. Al la esperantistoj dum la mescelebro aliĝis pluraj centoj de pilgrimantoj kaj tiel la Esperantlingva sankta meso iĝis unu el inter la plej multnombraj. Ceteraj interesatoj havis la eblecon sekvi la sanktan meson pere de la oficiala TTT-ejo de la Sanktejo.

Gravas la mencio kaj tiel la unuan fojon en Fatimo aŭdiĝis Esperanto.

Post la sankta meso la esperantistoj komune tagmanĝis kaj posttagmezo estis rezervita al la vizito de la domoj de la etaj paŝtistoj – geviziuloj kaj la tago estis finita per la privata preĝo en la Sanktejo. ■



*Fotis kaj raportas organizantino de la pilgrimo Marija Belošević, vicprezidantino de IKUE*



## FATIMA JARCENTO EN TRARIGARDO

13.05.1917: La Virgulino Maria la unuan fojon videbliĝas al Lucia, Hiacinta kaj Francisko apud Fatimo. Samtage la papo Benedikto la 15-a en la Siksta Kapelo en Romo konsekras kiel episkopon Eugenion Pacelli, la estontan papon Pion la 12-an.

13.06.1917: La dua apero de la Virgulino Maria.

13.07.1917: La tria apero de la Virgulino Maria, dum kiu Ŝi transdonas al la viziuloj sekretojn en tri partoj.

13.08.1917: La viziuloj estas fare de la distrikta hetmano malliberigitaj en la urbo Vila Nova de Ourém.

19.08.1917: La kvara apero de la Virgulino Maria surloke nomata Valinhos.

13.09.1917: La kvina apero de la Virgulino Maria denove en Cova da Iria.

13.10.1917: La lasta apero de la Virgulino Maria, dum kiu okazas granda sunmiraklo.

04.04.1919: Francisko mortas en la naskiĝdomo en Aljustrel.

20.02.1920: Hiacinta mortas en la hospitalo de Don Stefan en Lisbono.

25.10.1925: Lucia venas al Pontevedra en Hispanio por iĝi ordenanino de la ordena Kongregacio de la Sankta Dorota.

02.10.1926: Lucia komenciĝas novicperiodon kaj ŝi restas en la kongregacio 22 jarojn.

13.10.1931: La portugalaj episkopoj konsekras sian landon al la Senmakula Koro de Maria.

12.09.1935: La korpo de Hiacinta ĉe eltombigo estas trovita sendifekta.

08.12.1942: La papo Pio la 12-a en la Baziliko de sankta Petro en Romo konsekras mondon kaj Rusion al la Senmakula Koro de la Virgulino Maria; jam antaŭe (31.10.) li tiel faris en sia mesaĝo adresita al Portugalio.

25.03.1948: Lucia eniras karmelanan monaĥinejon en Coimbra, kie ŝi restos ĝis la fino de sia vivo.

13.05.1967: Okaze de la 50-a datreveno de la aperoj de la Virgulino Maria la papo Paŭlo la 6-a pilgrimas al Fatimo.

12.05.1981: Sur la placo de la sankta Petro en Romo estas farita atenco kontraŭ la papo Johano Paŭlo la 2-a.

13.05.1982: La papo Johano Paŭlo la 2-a pilgrimas al Fatimo, por danki al la Virgulino Maria pro sia savo ĉe la atenco.

25.03.1984: Johano Paŭlo la 2-a kunlige kun la episkopoj de la tuta mondo sur la placo de la sankta Petro en Romo konsekras la mondon kaj Rusion al la Senmakula Koro de la Virgulino Maria.

13.05.1991: Okaze de la 10-a datreveno de la atenco Johano Paŭlo la 2-a duan fojon vizitas Fatimon.

13.05.2000: Johano Paŭlo la 2-a la trian fojon pilgrimas al Fatimo por beatproklami Hiacintan kaj Franciskon; fine de la meso estas anoncite, ke oni publikigos la trian fatiman sekreton.

26.06.2000: La Kongregacio por la Kredinstruo publikigas la trian sekreton kun la teologia komentario de sia prefekto, la kardinalo Joseph Ratzinger.

13.02.2005: En la monaĥinejo de Coimbra mortas fratulino Lucia.

13.05.2010: La papo Benedikto la 16-a pilgrimas al Fatimo.

13.05.2017: La papo Francisko kanonizas Franciskon kaj Hiacintan. ■

*Transprenita el Katolický týdeník (Katolika semajngazeto) n-ro 20/2017*

# KION NUNTEMPE KREDAS MULTAJ KATOLIKOJ
## „Purgatorio ne ekzistas, la mortintoj estas ja tuj savitaj.“

La katolika instruo pri la lastaj aferoj de la homo, kiu nin laŭ pia kutimo de la Eklezio interesas ĝuste en la monato novembro, aŭ ĝi nin almenaŭ devus interesi, estas hodiaŭ eldonita al tuta torento da atakoj. Tiuj atakoj plejparte venas el propraj vicoj. Iuj ekleziaj reprezentantoj heroldas siajn herezojn, kiujn la popolo avide akceptas kaj ilin poste disvastigas publike precipe pere de amaskomunikiloj. Teologian kleriĝon ĉe ĵurnalistoj oni ne postulas. Ĉiu parolas kaj skribas, kiel tio plaĉas al li. La provoj elimini la herezojn restas plej-parte senrezultaj. Tio estas nenio miriga, ĉar al tiuj, kiuj sin sentas devoligitaj al spirito de la tempo kaj estas orientitaj kontraŭ la eklezia instruo eĉ larĝa publiko, ilia pozicio sin montras kiel tre oportuna.

Pri la menciita problemo sin okupas tiu ĉi artikolo. Gazeto ***Die Tagespost*** publikigis leteron de la legantino, kiu referencante al iu nenomita profesorino de teologio en Meissen skribis: „Niaj mortintoj estas tuj post la morto savitaj. Ili eĉ ne bezonas niajn preĝojn.“ *(22.10.2011)*

Tia opinio neadas ekziston de la purgatorio kaj krom tio esence subtenas teorion pri „universala savo“. Tiel kaj simile opinias hodiaŭ milionoj da modernaj katolikoj, kiujn enkondukas en la eraron superreganta misvojiga teologio.

La unua kaj la dua tezoj kontraŭstaras verdire la Evangelion kaj la katolikan kredinstruon. Ne eblas ilin opinii kiel esprimon de la „ĝoja mesaĝo“, kiu onidire „konsolas maljunulojn kaj funebrulojn“. Tio estus tre falsa, eĉ danĝera konsolo, ĉar ĝi povas al multaj homoj malebligi la veran konvertiĝon en decida momento de la vivo. ***Nur vero vin liberigos, diras al ni mem la Sinjoro.*** *(Joh 8,32)*

La instruo pri la universala savo (greklingve *apokatastasis panton*) estis kelkfoje malaprobita, komencante per Sinodo en Konstantinopolo en la jaro 543, plue poste per la 4-a Laterana Koncilio en la jaro 1215 *(DH 801)*. La problemon analizas kardinalo Scheffczyk en la libro *„Der Glaube der Kirche“* kaj François Reckinger en la libro *„Ĉu ĉiuj, ĉiuj en la ĉielon?“* En ĝi li skribas: „En Koncilio de Florenco 1439 evidentiĝis absoluta konsento de la plej alta nivelo, kiu malaprobis instruon pri la universala savo kiel herezon...“



Anton Ziegenaus klarigas, kial la teorio pri la universala savo estas neakordigebla kun la katolika instruo: „La neimageble alta amo de Dio signifas neniun certecon por la universala savo, kvazaŭ Dio fine ĉiujn alkondukas al la bona fino. Ĝi signifas intensan strebadon de Dio pri la amplena respondo de la homo. Sed kion faru Dio, se la homo tiun ĉi amplenan respondon ne donadas, kiam li rilate al la amo kondutas male facilanime kaj indiferente? Dio ne povas fari ion pli grandan, ol estis la ofero de lia propra Filo. Super tiu ĉi ofero ekzistas neniu alia ofero por la pekoj. *(kp. Heb 10,26)* Tial indikas tiu ĉi ofero eblon de la eterna savo aŭ ankaŭ eblon de la eterna damno. Ĉu devus Dio pro senfrukteco de tiu ĉi strebado delasi neceson de pentofarado kaj eldiri ĝeneralan amnestion? Sed poste la ofero de lia Filo estus tute


senbezona krueleco. La plej alta esprimo de la Dia amo inkluzivas kaj la eternan savon, kaj la eternan damnon.“ (*Die letzten Dinge, Steyr 1992)*

La eklezia verkisto Lactantius († ĉirkaŭ la jaro 320) skribis: „Vi vidas, kien tio kondukas, se ni rifuzus al Dio lian koleron. Fine neniu kredus aŭ nur tute malmultaj, ĉar eĉ tiuj la plej perversaj homoj fidus pri la senpuneco.“ – „Kiel povas la religio konserviĝi sen kiu ajn timo? Tion, kion ni ne timas, ni fine malestimas, kion ni malestimas, tion ni certe ne honoras.“ La timo antaŭ Dio ne kolizias kun la ordono ami Dion. Male, ambaŭ ordonoj kune kuntuŝe interrilatas: „Ĉiuj devas Dion ami, sed ankaŭ Lin timeti, ĉar Li estas la Sinjoro... Kiu ĉe ĝusta timosento ne amus la Patron de sia animo? Aŭ kiu povus senpune malestimi Tiun, Kiu havas la plej superan kaj eternan potencon super ĉio?“ *(Lactantius: De ira Dei)*

Al kontraŭdiro, kiu apelacias al vortoj de la apostolo, ke ***Dio volas, ke ĉiuj homoj estu savitaj*** *(1 Tim 2,4)*, diras sankta Aŭgusteno: „Ni devas pli proksimen rigardi, kion tio signifas. Ĉiuj homoj ne estas savotaj kaj eĉ ne la plimulto de la homoj. Tio aspektas, kvazaŭ ne devus okazi tio, kion volas Dio, ĉar al tiu ĉi Dia volo baras la vojon la homa volo. La respondo, kial ne estas savotaj ĉiuj homoj, tekstas do tiel: Ĉar ili mem ne volas.“ (*Aŭgusteno ench.* 96) Ĉar Dio respektas la homan volon, ne estas tio kontraŭ la Dia ordo, se ekzistas ankaŭ la homoj damnitaj.

### Instruo de la Eklezio pri la purgatorio

Papo Benedikto la Dekdua en la jaro 1336 aperigis enciklikon ***Benedictus Deus***, en kiu li difinas, ke „la animo de la homo tuj post la morto estas alkondukita sur la lokon de la estonta destino en la ĉielo, purgatorio, aŭ la infero“ *(DH 1000n)*. La koncilioj en Liono *(jare 1274, DH 856)* kaj en Florenco *(jare 1439, DH 1304)* difinis instruon pri la purgatorio rilate al la kristanoj en Oriento. Tridentina Koncilio tiel faris por defendi la dogmon pri la purgatorio kontraŭ ĝia neado fare de la protestantoj: „La katolika Eklezio, instruita per la Sankta Spirito, surbaze de la Sankta Skribo kaj delongtempa tradicio de la Patroj en la sanktecaj koncilioj kaj fine surbaze de tiu ĉi ekumena koncilio instruas, ke ekzistas loko de purigado kaj tie estas tenataj la animoj, al kiuj helpas propetoj de la kredantoj, antaŭ ĉio bonfarema ofero sur la altaro: tial elvokas la koncilio episkopojn, ke ili zorgeme atentu pri tio, por ke la transdonitan kaj sanan instruon de la sanktaj Patroj kaj sanktecaj koncilioj la kredantoj kredu, ĝin konservadu, instruu kaj ĉie heroldu.“ *(DH 1820)* La instruo pri la neceso de la postmorta puriĝado de ĝis nun neperfektaj animoj apartenas al devoliga apostola tradicio.



*Purgatorio en Dia Komedio de Dante*

### Rolo kaj esenco de la purgatorio

Purigado de tiom multaj kredantoj estas tial tiel necesega, ĉar ĝis nun nenio neperfekta povas rigardi Dion en lia pureco kaj sankteco. Tiel tio tekstas en Psalmo 24,3-4: ***Kiu supreniros sur la monton de la Eternulo? Kaj kiu staros ĉe Lia sankta loko? Tiu,***

***kiu havas purajn manojn kaj senmakulan koron...*** Simile sin esprimas la Sinjoro en la Surmonta Prediko: ***Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion.*** *(Mat 5,8)* Ke tio estos nur ili, rezultas el Apokalipso de sankta Johano: ***Sed nenio makulita eniros ĝin (la ĉielan Jerusalemon)***. Estus ebleco citi ankoraŭ vicon da pluaj lokoj el la Sankta Skribo pri neceso de la absoluta pureco. Tial estas pli bone jam ĉi tie surtere akiri la plej altan gradon de la sankteco pere de sinfordonemo en la volon de Dio kaj spirito de la ofero, ĉar ĉi tie povas la kredantoj per sia strebado atingi satisfakcion kaj savon. En la purgatorio estas la aktiveco de la animo limigita je satisfakcio pere de sufero. Ĝis nun neperfekta animo estas postlasita al preĝoj de la kredantoj surtere kaj al helpo de la Eklezio. La sufero, kiun la homo libere surprenas ĉi tie surtere, estas malpli doloriga ol la purigado en la purgatoria fajro!

**Duobla stato de la animo en la purgatorio**

Sed tiuj animoj estas tute sindonitaj en la volon de Dio. Ili tre suferas pro ĝis nun nepurigitaj kulpoj, sed ankoraŭ pli alta estas ilia senlima ĝojo, ĉar ili scias, ke ili estas savitaj kaj ke baldaŭ ili povos vivi kun Dio en legio de sanktuloj.

Bele tiun ĉi fakton de ambigueco de la puriga loko esprimis kardinalo Charles Journet. „Kiel ni povas nun percepti, ke en la animoj en la purgatorio estas samtempe neeldirebla anima sufero, ĉar pro la kulpo estis malproksimigita ilia horo de rigardado je Dio, sed samtempe estas ĉi tie neeldirebla spirita kontenteco, kiu baziĝas je certeco, ke la rigardadon je Dio ili atingos? Sankta Tomaso diras: »Estas vero, ke en la sfero de senso estas malĝojo, kiu subpremas koron, ankaŭ ĝojo, kiu ĝin plilarĝigas, kiuj ne povas ĉe la homo ekzisti kune. Sed en la spirita sfero tio estas alia, ĉar la animo nek kunpremiĝas, nek larĝiĝas. Tial la spirita doloro kaj la spirita ĝojo reciproke ne kolizias kaj ne estas nekunigeblaj, se ĉiu el ili rilatas al alia objekto, aŭ ili rilatas al unu objekto, sed sub diversaj vidpunktoj. Nenio malhelpas tion, ke la sama homo estas samtempe feliĉa kaj kormalĝoja. Kiam ni vidas, kiel estas persekutata justulo, ni estas samtempe feliĉaj, ĉar en li ni ekkonas justulon, sed ni estas ankaŭ malfeliĉaj, ĉar li estas persekutata. Tiuj du sentoj sin ne eliminas; ju pli granda estas grandeco de la animo, super kiu ni ĝojegas, des pli nin malĝojigas ĝia suferado.« *(STh III,84)*.

Tiel montriĝas, ke la samtempe daŭranta stato de neeldirebla suferado kaj neeldirebla ĝojego en la purgatorio ne nur estas ebla, sed ĝi apartenas al speciala mistero de la purgatorio. La amo al Dio, per kiu estas la animo superplena, donas al ĝi eĉ dum la suferado kontentecon, kiun ni ne kapablas imagi. Tiu ĉi kontenteco dume nenion forprenas de la purgatoria fajro el ĝia turmenta suferado." ■

*Heinz-Lothar Barth*

*(Die katholische Lehre über das Fegefeuer 23)*

Hungara pastro, abato Bődő, kunlernanto de V. I. Lenin, vizitis lin antaŭ lia morto. Tiam al li Lenin en momento de klara pensado diris: „Mi eraris. Mi sentas min mergita en oceano de la sango de la sennombraj viktimoj. Por savo de nia Rusio estus bezonataj dek Franciskoj el Asizo. Sed nun jam estas tro malfrue. Ni ne povas reen."

Vi faros la plej grandan servon al ŝtato kaj nacio, se vi ne levos tegmentojn de la domoj, sed la animojn de la civitanoj, ĉar estas pli bone, ke la grandaj animoj loĝu en malgrandaj domoj, ol la malaltaj animoj embusku en loĝejoj grandaj.

*Epiktetos*

Dum en Oriento homoj serĉas Dion, en Okcidento Dio serĉas homon, kiu antaŭ Li ofte zigzagas.

*Kard. Vlk/Max Picard*

# OFENSIVO DE SATANO

Abbé René Laurentin

***Fino de la 19-a jc. kaj la unua duono de la 20-a jc. mirinde al ni demonstras taktikon de la malbona spirito; ĝi estas la taktiko, kiun profete priskribis Ch. Baudelaire: La plej arogantaj ruzaĵoj konsistas en tio, ke li nin konvinkigas pri sia neekzistado. Tiun ĉi citaĵon de Baudelaire memorigis ripete Johano Paŭlo la Dua.***

Ni do estas atestantoj de du fenomenoj, kiuj ĉiam pli disvastiĝas: antaŭ ĉio temas pri interveno en kulturajn, socialajn kaj politikajn strukturojn, poste danke al sukceso de tiu ĉi kaŝita agado eliĝas sur la surfacon malfermite satanecaj kultoj, ofte en provoka simileco, kiuj formas medion, el kiu estis forigita ĉio sankteca. Tiuj ĉi satanecaj kultoj ĉiam pli disvastiĝas inter la junularo.



*Abbé René Laurentin*

Ni do travivas:

● kaŝitan kaj strukturan efikadon de la Malbonulo,

● lian elmergiĝon kun malkovrita vizaĝo en nia jarcento, ĉe kio oni ne forgesu, ke tiu ĉi malfermita manifestado havas tute anoniman dimension kaj estas sin realiganta per anonima infiltrado.

### Struktura akiro de potenco

Sukceso de Satano en la nuna epoko konsistas en tio, ke li anstataŭis sian senperan agadon, kiu kaŭzas timon el diablo, per alia, anonima, nevidebla kaj trankviliga agado, kiu enpenetras senbrue ĉiam pli en socialan medion, sen porti la sigelon „reganto de tiu ĉi mondo“, ĉar li uzas homajn „agentojn“, kiuj aktivas sur strategie gravaj lokoj. Tio do aspektas tiel, kvazaŭ li transprenus stilon de diskreta ĝenerala direktoro, kiu tenas en la mano ĉiujn ŝnuretojn, sen bezono mem vidigi sin publike.

Tiu ĉi metamorfozo efektiviĝis tre rapide kaj efike. La homa socio estis religieca kaj antaŭ ĉio kristaneca. Intertempe ĝi fariĝis tiom sekulara kaj laikeca, ĝis la nesubpremada bezono de la religio tute renversiĝis, ĝis ofte ĝi eliĝis en memmortigajn kaj rekte satanecajn sektojn.

### Eligo de Dio

La moderna historio de la civilizacio baziĝas en eligo de Dio kaj ekzalteco de la homo.

Ekde la tempo de renesanco progresas anstataŭigo de humanismo per deismo, kiu transformiĝis je racionalismo de filozofoj de la 18-a jc. kaj sekve poste je marksisma ateismo de la 19-a jc., kiu trovis sian daŭrigon en ekonomia materialismo. Ambaŭ nur malmulte diferenciĝas, kiel diras Chesterton. La tento de la hereda peko, kiu ricevis aspekton de bela mito, akiris en la nuna tempo tute konkretan formon: La homo sin devas liberigi de Dio. Ĝi proklamis ĉion transcendan kiel subpremantan diktaturon kaj samtempe kiel trompan bildon, kiun oni devas forigi. Dio, la Kreinto kaj fonto de ĉio bona, estis proklamita kiel tirano, kiu devas esti eligita el la konscio de la homo, kie Li estas respondeca pri ekesto de turmentantaj pensoj. La dankado devas cedi al malfido; la konsento al revolto; la infaneca amo al malemo; la kredo al rifuzo; „Vivu Dio“ al devizo „Morton al Dio!“; humileco al fiereco de la venka emancipo.

Post agresiva fazo de revolto, kiu signis

la 19-an kaj komencon de la 20-a jarcentoj, iĝis la faligita Dio en konscio de la homoj Granda Forestanto. Militantan ateismon de iuj grupoj anstataŭis agnosticismo, kiu estas tre disvastigita. Antaŭe ĝin konfesis ĉirkaŭe 250 milionoj, en la jaro 2000 ĉirkaŭe unu miliardo. Subtilaj meĥanismoj de diabla tento, kiujn al ni malkaŝas libro Genezo (Gen 3,3-5), denove ekvivis en la moderna konscio. Dio diris al vi: Ne manĝu el la arbo de sciado, por ke vi ne mortu, sed tio estas lia finto por malhelpi vin esti kiel Dio mastroj super la mondo kaj ekkonadi bonon kaj malbonon. Puberta, per siaj progresoj ebriiĝinta homaro de la 19-a jc. en tio trovis grandan ŝaton: Homo! Rigardu, nun vi elkreskis kaj baldaŭ vi estos mastro de tiu ĉi mondo. Vi havas ekscion. Vi ne bezonas Dion kaj lian providencon. La progreso kaj tekniko superos malriĉecon, malsanojn, militon kaj eble eĉ la morton. Dio volas vin teni en sklaveco, sed vi estas maturaj por libereco. Ja eĉ pli: Dio tute ne ekzistas. Vi povas senpune decidadi pri lia morto. Vi mem estas dio de la estonteco. Tion ĉion – ne sen troigo – heroldis diablo pere de marksismo kaj kredo je scienco en la 19-a jarcento. Ĝi estis profetaĵo de la nova feliĉo, kiu devus ekstari sur ruinoj de la superita kristanismo kaj ĝia morta Dio.

La scienco estis certa, ke ĝi pruvos verecon de la ateismo: Estas neniu kreinto, evolucio estas pli ol kreado. La progreso de la homo postulas falon de Dio. La disvolviĝo de la moderneco surprize sin turnis kontraŭ Dio, por ke ĝi povu agi prospere de la homo: prospere de lia aŭtonomio kaj kontraŭ Dia transcendo. Sed ĉi ĉio kondukis de liberalaj eŭforioj ĝis disreviĝoj kaj ofte ĝis malespero. La progreso superis nek malriĉecon, nek malsaton, nek militon, malsanon aŭ morton, male en multaj direktoj ilin ankoraŭ pli disvastigis. La homo, kiu forgesis pri sia deveno kaj sia dia destino, falis en absurdecon. Lia civilizacio fariĝis civilizacio de timo, en kiu trankviligaĵoj kaj drogoj iĝis lia ĉiutaga pano. La homo sen Dio estas totale elreligita, li havas neniun bazon de la vivo kaj neniun estontecon.

La valoroj, kiujn kreis tiu ĉi civilizacio, devus anstataŭi elanon fontantan el Dio. Anstataŭis Lin. Ili sin turnis kontraŭ kreitaĵoj. La ĉefa produktado sur ĉi tiu planedo estas produktado de mortigaj armiloj. Drogoj fariĝis monda superpotenco: ili vivtenas mafiojn, Fajran Ĉevalon kaj aliajn organizojn. Por Kolumbio estas drogoj la ĉefa kaj la plej granda industria faktoro. Ja eĉ la amo, reduktita je nura sekso, sin orientiĝis al morto: ununura zorgo estas, kiel travivi ĝuon, sen ebleco de koncipo, kaj se kun koncipo, do sen ebleco de nasko. Legaligo de abortigoj, ofte subvenciataj, kulpas pro pli granda nombro da mortintoj ol koncentrejoj kaj gulagoj entute.

En ĉiuj ĉi trajtoj, konfliktoj, fiaskoj kaj vojo en kaoson estas eble tute klare distingi realismon de Satano, kiu surprenas aspekton de diversvariaj impetegaj grupoj: amaskomunikilaj, komercaj, publikaj kaj ofte eĉ leĝaj strukturoj disvastigas nelimigite en la tuta mondo tiom da tentoj, ke Satano tute ne devas penadi kaj manaĝi. La potencaj „impetegaj grupoj“ efike subtenas tiun ĉi evoluon direktantan al apokalipsa fino.

Ĉu ne apartenas al agado de Satano ankaŭ novtempa disvastiĝo de islamo, kiu larĝe superas disvastiĝon de kristanismo kaj kiu kun si alportas ĉiam pli aktivan kaj konsternigan konekton de rekte furiozanta fanatismo kaj religio, kaj la religion, kiu eĉ kultas la saman Dion de la Biblio?

La genieco de Satano baziĝas en tio, kiel li dum duonjarcento disvastigadis en Oriento praktikan kaj en Okcidento ekonomian materialismon. Respondo al tio estas kreskeganta „sovaĝa religieco“ en formo de novaj sektoj, inkluzive de satanistaj. En tiu ĉi horo de la sukceso jam povas do Satano eliri el ombro de kaŝeco kaj lasi publike ovacii sin kaj la pekon. ■

*Laŭ libro: Le démon: mythe ou réalité?*

# LA REĜINO DE LA VIRGULINOJ

Antaŭ kelkaj monatoj mi en mia diagnozejo esploris okazon de ĉikanado. La deksesjara junulino estis turmentata en internulejo per siaj kunloĝantinoj pro tio, ke ŝi estis ankoraŭ virgulino. Ŝi elflankiĝadis, ŝi estis alia ol la aliulinoj. Tial ŝi estis centro de ilia atentemo, ĉar ŝi konfesis sian korpan purecon. Ŝi spertis mokojn, ofendojn, humiligojn kaj tion ŝi portis tiel malfacile, ke ŝi enfalis depresion.



Ni vivas en la tempo, kiu renversis la valorojn sur la kapon. Pro kio iam la homoj hontis, per tio ili hodiaŭ fanfaronas. Por tio, per kio ili iam fieris, ili nuntempe hontas.

La deksesjara sekse pura junulino estas kaŭzo de la moko kaj turmento. En kia tempo ni vivas? En la tempo, kiu perdas naturajn kaj supernaturajn valorojn. La naturaj valoroj estas anstataŭataj per la valoroj artefaritaj kaj normoj de la agado ne estas devenigitaj el la vojoj en la regnon de Dio, sed de la televidaj ekranoj. La virgeco ne estas nur ebleco de ĝia perdo, la virgeco estas ankaŭ decidiĝo por certa vivstilo, eniri la geedzecon pura, havi principojn, kiujn ĉi tiu mondo ne komprenas. Estas devo de la gepatroj, precipe de la patrinoj, ke ili klopodu al siaj filinoj ekspliki, ke ne estas la honto havi la grandegan donacon de la pureco, kiun ili proponos al siaj edzoj, ke ne estas honto ne esti kiel tiuj ceteraj, ke en la forta volo, en la kapablo de memregado estas la granda forto kaj grandega kapitalo kaj se la homo, ĝi estu junulo aŭ junulino, la decidiĝo por io bela alportas duoblan utilon. Ĝi kultivas grandan volon, kiu estas bezonata por ni ne nur en la seksa vivo, en geedzeco, sed ĝi kondukas ankaŭ al plidelikatigo de la sento kaj senco por la valoroj. En nia Ĉeĥa Respubliko divorcas ĉiujare ĉirkaŭ 30 mil geedzecoj. Proksimume la sama nombro da infanoj perdas tion, kio estas la plej grava, etnan familion.

Kaj kiaj estas la kaŭzoj de la divorcoj? Inter tri la plej nombraj kaŭzoj de la divorcoj apartenas malfideleco, seksa senbrideco. La mondo konstante opinias, ke la eklezio estas kontraŭ la sekso. Ne estas. La eklezio estas kontraŭ la sekso, kiu estas neĝusta, humiliganta kaj neriĉiganta la homon. Ni ja ne povas diri, ke la eklezio estas kontraŭ tranĉilo, sed dependas de tio, kiucele ni ĝin uzos. Se ni per ĝi tranĉos la panon por la malsatantaj infanoj, la eklezio tiun faron benas, sed se ni per la sama tranĉilo iun difektas, do tian agon la eklezio malaprobas. Same estas koncerne la seksecon. Se la sekso estas vivodonanta, ĝi pliriĉigas la geedzojn, se la sekseco plenumas sian naturan kaj eĉ supernaturan taskon, ĝi estas la benita sekseco.

Ni instruu kiel kristanoj niajn infanojn, ke ili la virgecon ne rigardu kiel malplivalorecon kun honto, kun malŝato aŭ kun nedecidemo. Ke la infanoj el la kristanaj familioj komprenu la virgecon kiel signon de la preparo por la geedzeco kaj ni petu la Virgulinon Maria, kiu estas la reĝino de la virgulinoj, ke Ŝi ne nur niajn infanojn fortigadu, sed ke Ŝi ankaŭ iliajn geedzecojn kaj la estontajn iliajn familiojn benu. ■

*Sac. D-ro Max Kašparů*

# FESTO DE JESUO KRISTO LA REĜO

La liturgia jaro finiĝas per soleno de Jesuo Kristo la Reĝo. Ankaŭ la mondo havos sian finon. Jesuo Kristo estas unu-nura reĝo, kiu tiun finon transdaŭros. „Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo“, judoj Jesuon malbone perceptis. Ili atendis liberiganton, gvidiston de la Dia popolo, iun potenculon kontraŭ gravuloj de tiu ĉi mondo. Ili esperis, ke ili lin ekvidos sur trono de gloro, sed Li suriris malgloran tronon de la kruco. Ili atendis Lin kun krono ornamita per gemoj, sed Li akceptis nur dornkronon. Ili atendis, ke Li venos vestita en purpuro, sed ili ekvidis Lin en purpuro de la sango. Ili opiniis, ke per la surkruca morto ĉio finiĝis kaj la krucumiton neniu plu rememoros. Sed male tio estis komenco de lia triumfo.



Surkruce Jesuo iĝis universala Reĝo, ĉiujn Li altiras al si. Tie li ekkomencis sian regadon, montris sian amon, surkruce li donis stimulon por meditado al ĉiuj sanktuloj, kiuj plenigis tutan lian ĉielon. La kruco iĝis standardo, en kiu estas forto, kiu gvidas mondon, ke ĝi amu Savinton, kiu nin tiom amis. Jesuo estas ununura Reĝo, ĉar la Patro donis al Li regadon super la tuta mondo: por Li kaj pere de Li estis kreitaj ĉiuj aĵoj. Ĉio, kio havas vivon, havas vivon pere de Li. Li estas la Vivo. Jesuo estas Reĝo ankaŭ kiel homo, Li estas la filo de David, la hebrea reĝo. Jesuo estas Elaĉetinto, Li estas la Reĝo el titolo de sia venko. Li liberigis nin el sklaveco de la peko, el infero. Li liberigis nin de pasioj kaj donis al ni virtojn de sankteco. Li donis al ni liberon de Diaj infanoj. Li elaĉetis nin per prezo de sia sango.


La regno de Jesuo ne estas el ĉi tiu mondo kaj ĝi ne estas la regno de nur unu lando, eĉ ĝi ne komenciĝas sur tiu ĉi mondo. Jesuo mortis, ke Li iĝu la Reĝo de ĉiuj homoj, por ke ili havu vivon. La surteraj reĝoj mortigas ali-ulojn, por ke ili povu reĝi. Jesuo havas nek armeon nek armilojn, Li ne volas militojn eĉ ne sangelverŝon. Al neniu Li entrudigas sian volon, li ne faras el homoj sklavojn, sed amikojn. Li ne havas sian limigitan teritorion. Lia estas la tuta tero kaj la ĉielo. Jesuo volas amon kiel ligilon inter la homoj eĉ kiel ligilon kun Dio. Li ne reĝas super korpoj, sed antaŭ ĉio li reĝas al la animoj, Li tronas en homaj koroj. Li ne havas palacojn, sed sanktejojn, kie Li oferas sin ĉiutage suraltare. Li ne promesas surteran gloron, nur la ĉielan. Lia regno baziĝas sur humileco. Subuloj de Jesuo Kristo estas tiuj, kiuj amas Dion kaj proksimulojn; tiuj, kiuj serĉas Dion per sincera koro; kiuj sin sanktigas per sakramentoj, konservas liajn ordonojn kaj vivas laŭ evangelio; tiuj, kiuj respektas pacon kaj ĝojas pro la graco.

Malamikoj de lia regno estas tiuj, kiuj vivas en peko; fieruloj, kiuj ne preĝas kaj ne amas Dion; kiuj amas monon anstataŭ Dion. Fiero kaj malamo estas mortiga veneno de homo. Ĉe krucpiedo estis liaj malamikoj, kiuj mokis Lin. Sed estis ĉi tie ankaŭ Maria kaj Johano, piaj virinoj, kiuj amis kaj priploris Lin. Ankaŭ nune estas ĉi tie unuj, kiuj atakas Lin, kaj aliuloj, kiuj Lin amas. Ankaŭ hodiaŭ Jesuo estas signo, al kiu oni rezistos. Estis tiel dekomence kaj tiel estos ĝisfine. Judoj diris: „Ni ne volas, ke tiu super ni reĝu!“ La pekuloj nune diras la samon ne per la vortoj, sed per la agoj. Por satisfakcii tiujn pekojn, ni strebu per la tuta koro kaj plename: „Ni volas, ke tiu ĉi Reĝo estu en ni, en niaj familioj, en niaj lernejoj, en nia socio!“ Tio estas la plej bela himno, per kiu ni povas soleni feston de nia Reĝo. ■

*Jaroslav Branžovský*

# KANTO HONORE AL JESUO LA REĜO

**Laŭ la ĉeĥlingva teksto „Ježíši, Králi“ de F. Žák kaj J. Vašica.**
**Melodio de J. Trumpus. Esperantigis sac. Jan Filip.**




2. Bona Jesuo, Reĝo de l´ mondo, / de Vi raviĝas beatular´, / el via Koro milda fontiĝas / de la feliĉo sen fundo mar´. / Vin sakramentaj formoj vualas, / Vin sentas l´ amo malgraŭ mister´. / Ligu por ĉiam nin kun Vi, Reĝo / de la ĉielo kaj de la ter´.

3. Bona Jesuo, Reĝo de l´ mondo, / Dia Savanto, al via tron´ / eĥas la himnoj Vin gloregantaj, / de Vi devenas ja ĉiu bon´. / Aŭdu la sonon de l´ kanto nia, / suprenfluganta al firmament´, / bona Jesuo, benu nin ame, / ke ne malvenku ni en la tent´.

4. Bona Jesuo, Reĝo de l´ mondo, / per via sango Vi savis nin. / Reĝu en koroj de la gefiloj / Kredo, Espero, Amo sen fin´. / Ni je Vi kredas, Vi estas Dio, / Vi estas Vojo, Vero kaj Viv´. / El via Koro brilas al homoj / de l´ vera ĝojo la perspektiv´.

5. Bona Jesuo, Reĝo de l´ mondo, / post la migrado tra larma val´ / en via Regno donu ripozon / post la suferoj, post la batal´. / Al ni alvenu la Regno via / sen la doloro, sen larma flu´, / kie radias nur feliĉego, / ne estingiĝas, ne ĉesas plu.

6. Bona Jesuo, Reĝo de l´ mondo, / Vi familiojn regu per ben´. / Amo, fidelo lumu al ili, / de malkonkordo fuĝu venen´. / Mizerikordo korojn varmigu, / kiujn malamo kaptis en ret´, / helpu al ĉiuj vivi konforme / laŭ familio de Nazaret´.

7. Bona Jesuo, Reĝo de l´ mondo, / tiru popolojn al via Kor´, / ke reviviĝu en la homaro / de l´ vera paco la bonodor´. / La Diaj virtoj ĉie ekfloru, / kaj via Koro estu oaz´ / por la homaro, kiu soifas / je freŝaj ondoj de via grac´.

8. Bona Jesuo, Reĝo de l´ mondo, / Vi l´ Eklezion fondis por ni. / Al la ŝafejo unu nin voku, / al la Paŝtisto unu, al Vi! / Igu nin ami la Eklezion, / kie Vi vivas plu sur la ter´, / kaj via Dia amo senfina / venkos fieron de la infer´.